

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 1/1987

januaro 1987

Ni praktikis la amikecon inter KEP kaj EK Baumschulenweg en Berlin

Jes, ni ekis tre multpromese kaj povis ĝui la mirindan, per neesperantistoj nekompreneblan tujogan amikecon, ekreganta diverslandanojn unuavide pro la lingva unueco, pro Esperanto!

Ni, pragaj gastoj, kore invititaj kaj akceptitaj en Berlin, ĝuis la gastamon, amikecon kaj internaciecon de ĉiuj gesamideanoj, kun kiuj ni renkontiĝis dum la tagoj 17-19.10.1986. La aminda, bela, Esperanton eminente reganta prezidantino Monika Ludewig modele zorgis pri ni, konatigis al ni la geklubanojn, gekursanojn – samlingvanojn.

Ili multon sciis pri ni dank' al Bulteno kaj Lančov, kiun partoprenis ekzemple la ĉarma Kristine ĉi-jare, pri kio ŝi rakontas kaj gaje kaj kun certa nostalgio. Ni multe dankemas al d-rino Inge kaj ties edzo, kiuj dediĉis multe da tempo kaj fortoj aŭtigante nin tra la urbego por montri al ni kiel eble plej multe da vidindaĵoj de Berlin.

Kaj estis kion rigardi! Berlin estas moderna, pura, grandioza urbo kun unikaj muzeoj kaj preĝejoj. Kaj kiu povus forgesi la vesperajn babiladojn, la elegantan Anemarie, la ekskurson al Köpenick kun Monika ktp. ktp. Nu, kion aldoni? Estis ja nur la unua paŝo, provo, komenco. Espereble la karaj amikoj venos baldaŭ en Praha, kie ni volonte reciprokos la afablan akcepton intencante plivastigi la amikajn interrilatojn, piloftigi reciprokan vizitadon kaj per tio praktiki nian lingvon kaj eluzi la eblecojn, kiujn Esperanto donacas al siaj parolantoj.

H. Štruncová

Ĉeĥdevena E-kulturo en Poznano

En la pola urbo Poznano okazis en la tagoj 10.-12.10.1986 "La kvinaj artaj konfrontoj en Esperanto" – ARKONES 86. Tiu ĉi trarigardo de diversspeca E-kulturo estis aranĝita helpe de la kulturdomo "ORBITA" kaj ties Esperanto-centro. Plua organizanto estis Studenta E-klubo ĉe Distrikta konsilio de Pola studenta asocio en Poznano.

La aranĝo enhavis diversajn ekspoziciojn, prelegojn, prikulturan seminarion, ankaŭ prezentadon de poemoj, spektakloj kaj kantoj fare de ĉefe junaj profesiaj kaj amatoraj artistoj. Oni povis spekti kaj pritaksi nivelon de E-kulturo antaŭ ĉefaj eventoj, kiuj okazos en Pollando kadre de la Jubilea jaro 1987.

Unusola eksterlanda partoprenanto el la socialismaj landoj estis ankaŭ ano de la praga E-klubo Jan Pečený, kiu ricevis de la organizintoj oficialan invitilon por prezenti muzikigitajn originajn E-poemojn. Dum du memstaraj programeroj li krom aliaj poemoj prezentis akompanante sin per gitaro ankaŭ versojn verkitajn de nia kara poetino Eli Urbanová, kiuj ricevis grandan aplaŭdon.

Espereble tiu ĉi partopreno ne estis la lasta kaj ankaŭ en estonteco oni povos trovi spacon por artaj konfrontoj de nia E-kulturo sur internacia kampo.

(En la presita programo de ARKONES 86 oni povas legi: 10.10.1986 PIATEK —

18.00 Recital Jana Pecseneo (Czechoslowacja) kaj 11.10.1986 SOBOTA —

20.30 Wieczor piosenki i poezji kaj inter la multaj gastoj: Jan Pecsény)

Eli Urbanová

V i n t r o

Lilie blanka
estas korp' de, Vintro.
Vidante Ŝin
sur la tegmentoj kuŝi
kun cic' glacia,
kun virgpura ventro
vi, la unua,
iel timas tuŝi.

Blindiga bela
elloganta larmon.
Kion Ŝi scias
pri la urbopavimo?
Vi, la unua,
taksas Ŝian ĉarmon
kaj baraktadas
inter pi' kaj krimo.

Tamen vi rabis,
homo senkompata.
Jen la unua
kaj li sin ne bridas!
Ĉar ĉiu tuŝo,
eĉ plej delikataj
postlasis signon,
kiu vin perfidas.

(El "Verso kaj larmo")

La ĵurnalo Guardian pri ĈSSR

La grava brita ĵurnalo Tre Guardian dediĉis sabate /1986-11-01/ la tutajn du paĝojn al turistiko en Ĉeĥoslovakion kaj al pluaj informoj pri nia lando kaj reklamoj al ĉeĥoslovakaj produktoj.

En la ampleksa artikolo raportis la aŭtoro siajn impresojn pri la vizito de okcident-bohemiaj banlokoj, urbo Plzeň kaj Praha. En la amuza priskribo de akvokuracado, kiun li provis en Karlovy Vary, li informas britan leganton, ke en tiu ĉi plej granda el 37 banlokoj en ĈSSR refortigas ĉ. 85.000 pacientoj kaj ke la ŝtato dediĉas al la kuracado de ĉiu paciento egalvaloron de 500 britaj pundoj (kio proksimumas al la meznivela monata salajro en Britujo).

La raportisto ovacias elegantecon de Mariánské Lázně, imperiestran pompon de Karlovy Vary, la Prazdroj-bieron el Plzeň kaj "gigantan kaj nekonkereblan Karlštejn", fine Praha – la urbon, kiu evoluis kvazaŭ ĝi fariĝu "arkivo de arkitekturo". Li elnombras ĉiujn konstrustilojn kaj la ĉefajn rimarkindaĵojn de la ĉefurbo, inkluzive Karloponon, "unu el la plej famaj mirindaĵoj de la eŭropa turismo".

Laŭ ĈTK H.Š.

Nederlanda instituto pri analizo de nutraĵo en Zeist evoluigis procedon, ebligantan gustumadon de vino helpe de komputilo. Per la nova procedo eblas difini ne nur la enhavon de alkoholo kaj sukero, sed surbaze de Kemia konsisto de vino kaj specon de vinberoj kaj regionon de la kultivado. Grundoj de vinregionoj havas specifajn kombinaĵojn de spurelementoj. Tiujn ĉi kemiajn "daktiloskopiaĵojn" eblas pruvi en vino helpe de absorbt-spektroskopo. La sistemo povas ekzemple rapide malkasi falsadon de vino per glikelo aŭ metanolo kaj pruvas la devenon de miksaĉita vino, kion eĉ la plej bonaj gustumistoj ne kapablas.

Laŭ R.P. H.Š.

Atenton!

La 23-an de februaro 1987 okazos regula J a r k u n v e n o de nia klubo en la klubejo en Zahradní Město. En la jarkunveno ni elektos novan komitatton de la klubo. Tial venu ĉiuj kaj venigu ankaŭ aliajn membrojn de la klubo. Ne forgesu!

Atenton!

Atenton!

Atenton!

El la hejmtaskoj de niaj kursanoj

Kato

Kato estas besto. Oni diras (almenaŭ iuj homoj asertas tion), ke ĝi estas dom-besto. Sed laŭ mia scio ĝi donas al ni nek lakton, nek ĝia hararo valoras multe kaj mi pensas, ke eĉ ĝia viando ne estos tee bongusta – almenaŭ al mi venis ankoraŭ neniu apetito al kato (per tio mi pensas memkompreneble nur kvarkrurajn katojn). Kaj kiel kato aspektas? Tio estas tre simpla; ni ekkonas ĝin tre facile: ĝi aspektas kiel hundo, sed ĝi ne estas hundo. Hundo apartenas nome inter estularo hunda (mi havas nome ankoraŭ iajn sciojn el lernejo) kaj kato inter estularo kata. Sed ambaŭ tiuj kreitaĵoj havas ion komunan: krom la korpo ili nome havas ankoraŭ kapon (unu) antaŭe kaj voston (egale unu) malantaŭe. Laŭ tio oni ankaŭ ekkonas, kie kato havas sian antaŭon kaj kie la malantaŭon. Do se ni rigardas katon de antaŭe, ni konstatas, ke en sia kapo ĝi havas du okulojn, egale kiel hundo. Sed per tiuj ĉi okuloj la kato scipovas lumi en mallumo, kion hundo ne kapablas fari. Kapo de kato estas kunigita kun ĝia korpo helpe de mallonga elasta vila konekto-tubo, kiun oni nomas kolo. Sed tiu estas tiom malgranda, ke oni eĉ ne devus paroli pri ĝi. La katon karakterizas tio, ke ĝi la plej grandan parton de la tempo ie kuŝadas (sur kanaplito aŭ sur divano) kaj malhelpas (ĉefe en malgrandaj loĝejoj en loĝdomaroj). Sed por ke ĝi povu eventuale ankaŭ ekstari, tiucele servas al ĝi la kruoj, kiujn ĝi havas eĉ kvar, du antaŭajn kaj du malantaŭajn. Flanke de kapo estas la antaŭaj kruoj kaj flanke de vosto la malantaŭaj. Vivantaj estaĵoj havas kutime ian interkomprenan lingvon – tio estas ankaŭ la kazo de nia kato. Sian lingvon havas fine ankaŭ la hundo. Sed la kato diferencas de la hundo per tio, ke ĝia lingvo estas alia kaj tio ankaŭ estas eble unu el kaŭzoj, kial tiuj du ne komprenas sin tro kaj ne amas sin. Sed al homo la kato kondutas tute amike.

Josef Vích

Kio kondukis min al Esperanto

Tio estas pli longa rakontado. Dirite per vortoj de klasikulo (bedaŭrinde mi ne scias, kiu estis tiu) – malantaŭ ĉio serĉu la virinojn. En mia okazo ne la virinojn, sed la virojn.

Kun Esperanto mi unue renkontiĝis ĉe divenado de krucenigmo. Tie ĉi mi eksciis, ke E-o estas kreita internacia lingvo. Nenion plu.

Kiam mi komencis studi en Prago, mi unufoje promenis en Jilská-strato kaj ekvidis surskribon – Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Post mallonga hezito mi eniris kaj demandis pri kurso de E-o. Mi ricevis aliĝilon por koresponda kurso. Sed – la homo opinias...

Mi enamiĝis. Vere, tiu amo finiĝis, venis pluaj kaj poste unu granda kaj longa. Subite mi restis sola. Mi ne diras, ke nur pro kulpo de mia estinta fianĉo. Sed ĉion, kion ni faris, ni faris kune, ni havis komunajn geamikojn kaj interesojn. Mi ne sciis, kion fari. Komenci drinki? Kial?

Mi komencis ordigi mian ĉambbron. Inter variaj dokumentoj mi trovis neresponditan aliĝilon. Tuj mi ĝin plenigis kaj sendis.

Post du semajnoj mi ricevis la unuan lecionon kaj la lernado komenciĝis. El la tekstoj de ekzercaro mi eksciis, ke E-o ne estas nur lingvo, sed precipe tutmonda movado. Bona kaj utila movado. En duono de koresponda kurso mi komencis viziti ankaŭ vesperan kurson de profesoro Horský.

Mia privata vivo dum tempo ŝanĝiĝis, mi ne estas sola kaj havas pluajn interesojn. Sed E-o estas mia hobio plu.

Pardonu, ke mia rakontado estas tiom longa kaj certe ne senerara. (Ne plu.Rim. de red.) Eble ĝi aspektas kiel el la tiel nomata "Ruĝa bibliotekokaj estas ridinda aŭ enuiga. Mi povas garantii nur ĝian verecon.

K.H.

Noto de la kursestrino: Via rakontado estas nek ridinda, nek enuiga. Ĝi estas eminenta.

H.Š.

Nia nelacigebla, ĉiam helpopreta eterna junulo s-ano Ŝ e v ĉ í k fariĝis komence de decembro o k d e k j a r a . Ni elkore gratulas kaj deziras pluajn jarojn da sano, kontento kaj bona humoro.

Esperanto-klubo ĉe muzeo de Janko Král', nám. Osloboditeľhv 31, 031 01 Liptovský Mikuláš, Ĉeĥoslovakio, informas vin, ke ĝi okazigos la Vintran Renkontiĝon de Esperantistoj en Malaltaj Tatroj (VERMAT '87) sub aŭspicio de junulara sekcio de Slovacia Esperanto-Asocio, dum tagoj 20.-22. de februaro 1987 en valo de civito Liptovský Ján en konstruaĵo de Pionira tendaro de Distrikta nacia komitato.

Programo de VERMAT: Vendrede la 20-an – alveno, loĝigo kaj vespermanĝo – ĝis la 20-a horo. Je la 20-a horo – malfermo de VERMAT kun interkona vespero.

Sabate la 21-an – 07,00-a h. matenmanĝo, je la 07,30-a h. trarigardo de vidindaĵoj de la regiono, eventuale skiado. Je la 12,30-a h. tagmanĝo, je la 13,30-a h. banado en termal-baseno, je la 18,30-a h. vespermanĝo, je la 19-a h. vespera programo (prelegeto, kvizo, lingvaj ekzercoj, lumbild-projekciado, disko-danco k.t.p.).

Dimanĉe la 22-an - 07,00 h. matenmanĝo, je la 07,30 h. promenado al la ne tre alta montpinto en ĉirkaŭaĵo. Je la 12,00 h. tagmanĝo kaj fermo de VERMAT '87 – reveno al siaj hejmoj.

Loĝigo estas en du- kaj tri-litaj ĉambroj.

Partoprenkotizo: Por membroj de ĈEA kaj SEA

Eksterlandaj

ĝis 30-jaraĝaj: super 30-jaraĝaj:

partoprenantoj:

Kĉs:

200.-

250,-

400,-

Al enlandanoj ni sendos poŝtpagilon post ricevo de aliĝilo. Eksterlandanoj sendu aliĝilon kaj partoprenkotizon ili pagos surloke. La unua servo: vespermanĝo la 20-an de februaro. La lasta servo: tagmanĝo la 22-an de februaro.

Al urbo Liptovský Mikuláš vi uzu personvagonaron, rapidvagonaron aŭ longdistancan aŭtobuson. Aŭtobushaltejo antaŭ la stacidomo – uzu aŭtobuson el la kajo 13 al Liptovský Ján – finstacio ĉe ripozdomo Ďumbier. Forveturoj de aŭtobusoj el Liptovský Mikuláš: 12,10, 14,17, 15,20, 15,50, 16,40, 18,20, 20,35, 22,20.

Ĉe aŭtobusa finstacio ni vin atentos! Ne forgesu verdan stelon! Ni ĝojas jam nun je via partopreno! BONVENON! ! !

En la aliĝilo al VERMAT '87 oni skribu nomon kaj plenan adreson, numeron de legitimilo aŭ pasporto, daton kaj subskribon.

Jaroslav Hašek

Stranga besto

Origine mi redaktis "Librobindistan revuon". Foje mi sukcesis verki artikolon, ke pro higienaj kaŭzoj oni ne bindigu librojn, ĉar en la amelo, kiun oni uzas por la bindado, vivas granda kvanto de bakterioj. La artikolo vekis grandan sensacion en la gildo de librobindistoj kaj mi estis de tie elpelita. (Alie oni diras, ke iun oni kaptis je kolumo.) Havante riĉajn spertojn ĵurnalistajn el tiu ĉi revuo, mi akceptis okupon en naturscienca revuo. La posedanto de la revuo gvidis min al ŝranko, sur kiu staris trigamba kokino. Kaj li demandis min, ĉu mi scias, kio ĝi estas. Mi diris, cedinte tri paŝojn malantaŭen, ke ĝi aspektas kiel kasuaro, sed ke tio povas esti ankaŭ aŭ fazano, aŭ pli bone taĥigloso en plej tenera junaĝo.

Tre longe li disputis kun mi, kaj kiam mi fine diris, ke ĝi estas hinda anaso, li frapis mian ŝultron kaj diris simple:

„Kara amiko, ĝi estas trigamba kokino, skribu laŭ la samaj intencoj, laŭ kiu vi difinis tiun ĉi kortbirdon, ĉar vi scias, la publiko kaj niaj legantoj volas havi ian sensacion.”

La revuo aperadis dusemajne. Mi havis ĉemane „La vivon de bestoj” de Brehm kaj aliajn natursciencajn verkojn, laŭ kiuj la bestoj dividiĝas je certaj politikaj partioj, kiaj estas: simiuloj, simioj de la malnova kaj nova mondo, serpentoj, saŭrioj kaj aliaj monstroj, fiŝoj kaj tenioj, parazitaj vermoj, moluskoj, sarkoptoj, akaroj kaj papilioj. Tio estis do miaj spertoj el Brehm. Kiam mi tion serioze pripensis, mi devis rekoni, ke kvankam de bestoj estas sufiĉa kvanto por fariĝi granda plago por la redaktoro de la naturscienca revuo, tio tamen ne estas io aparta, kio streĉus la atenton de la legantoj. Ĉiu leganto de tiu naturscienca revuo certe jam longe sciis, kio estas paviano, tigo,

angviso, baleno, hejma muso, formiko, elefanto kaj pulo, aŭ salamandra kaj krokodilo, ĉar tiuj ĉi bestoj estis en tiu revuo tiomfoje frekventitaj, ke eĉ hundo de ili pankruston ne premis.

Estis turmenta situacio; unue mi skribis tre atentostreĉajn artikolojn, en kiuj mi emfazis, ke la leono terure kriegas en la dezerto kaj la silkraŭpo servas al farado de silko, ke la hejma muso zumas, la kuloj ke vivas ĉefe ĉirkaŭ la akvoj kaj komune kaj suĉas la sangon de la varmsangaj animaloj, ĉefe de fiŝkaptantoj kaj ŝipanoj.

Sed la legantojn tio ne interesis, tion ili jam sciis longe. Ilin eĉ ne interesis, kiam mi skribis, ke la heliko kaŝas sin en sian konkon, kiam ajn ĝi sentas danĝeron.

Kiam mi fine skribis, ke la vipurmordo estas venena, iu abonanto skribis en la redaktejon, ke nia gazeto ne plu skribu pri tiaj stultaĵoj, sed ke ĝi penu aperigi ion originalan. Plena de komplezemo kontentigi la legantojn, mi do skribis jenan artikolon:

„Infaho en lulilo pinĉmortigita de salamandroj”.

En la artikolo mi rakontis, kiel proksime de Trpoměchy patrino forlasis infanon en lulilo apud granda marĉo kaj mem ŝi foriris nemalproksimen por labori sur la kampo. Post unu horo ŝi revenis al sia solinfano, kiun ŝi trovis tute ĉirkaumordita de salamandroj, grandkvante kunkurintaj pro ploro de la infano el la proksima marĉo.

Kiel la policanaro malkovris, la salamandroj apartenas inter t.n. fajrajn salamandrojn, kiuj, kiel la nomo jam montras, estas treege danĝeraj.

Kiam mi tion publikigis, la legantoj ree ne estis kontentaj. Iu delongtempa abonanto, profesoro pri naturscienco, skribis, ke en tiu ĉi kazo ne povas temi pri akvaj salamandroj, sed pri salamandroj surteraj, ke sekve la policanaro eraris.

Do mi estis devigita, por streĉi la atenton de la legantaro, skribi pri vampiroj. Kompreneble tiukaze mi faris reklamon al nia bestnegoĉejo, fondita ĉe la revuo, notinte samtempe al la artikolo:

„Juna vampiro sesmonata kostas ĉe ni 120 ĝis 240 kronojn, laŭ tio, kiel ĝi estas kamuflita kaj striita.”

Kiel tio finiĝis, scias la publiko el la juĝa proceso, ke por paro da vampiroj ni akceptis antaŭpagon, sed la vampirojn, destinitajn por iu grafo, ni ne liveris ĝustatempe.

Pro tiuj ĉi cirkonstancoj mi estis devigita, por ke la legantoj amuziĝu, skribi pri aliaj, malpli konataj bestoj kaj ties agado, precipe atentante la psikologion de la bestoj. Foje dum mia promeno mi vidis muson, naĝantan en akvo. Denaske mi ion similan ne vidis. Mi mem jam skribis antaŭe pri tio, ke la musoj vivas ĉefe en la grenejoj kaj kampoj, en malfreŝa fromaĝo, en botoj kaj en pajlosakoj. Mi haltis mirigita kaj longe pensis, kiaj motivoj povis igi la muson salti en la akvon. Mi komprenis tute certe, ke tiun ĉi muson, kiu el la akvo elŝovadis sian kapeton, instigis tute strangaj cirkonstancoj al tio, ke ĝi neatendite naĝas preter la bordo de la fiŝlago. Mi trastudis la psikologion de la bestanimo, kaj venis al tiu opinio, kiu enhavis mian observadon sub titolo „Konfuzita muso ĉe Zbiroh”. Mi strebis priskribi ĉiujn psikajn devojn, kiuj gvidis la malfeliĉan muson al tio, ke nekutime, zorgante neniel siajn gefratojn arvikolojn, ĝi sin padelbanu kaj subakviĝu, kaj post momento refoje elŝovu la kapeton, rigardante ĉirkaŭ si kiel frenezulo. Precipe mi emfazis, ke en proksima stopla kampo mi vidis kelkajn mirigitajn arvikolojn, kiuj probable kun ĝi jam pli frue malamikiĝis kaj ĝin serĉis. Mi skribis plue, ke en la tuta ĉirkaŭaĵo oni ne memoras similan fenomenon kaj el la bestpsikologio ni tute ne konas similan okazon, ke kreaĵo, dependanta de firma tero, kun tiel konsternige malfermitaj okuloj padelis sin en la plej proksima akvo.

Kiam estis tiu ĉi artikolo publikigita en la sekvinta numero, mi ricevis en la redaktejon jenan leteron:

„Estimata redakcio! Via interesegega artikolo en la lasta numero sub la titolo "Konfuzita muso ĉe Zbiroh" tre plaĉis al mi kaj mi kuraĝas noti, ke similan fenomenon mi observis en mia junaĝo en ĉirkaŭaĵo de Třeboň. Mi estis tiam vizite ĉe mia avo kaj faris oftajn ekskursojn al tieaj grandaj lagoj. Dum unu tia ekskurso mi sidiĝis sur la baraĵon de la fiŝlago "Mondo" kaj kiel naturamiko mi observis jam tiam skarabojn, papiliojn, efemerojn kaj aliajn bestojn. Estis preskaŭ tagmezo, kiam ĝuste ĉe la lagbaraĵo mi rigardis suspektindan plaŭdadon. Mi descendis sur la ŝtonoj iom malalten de la baraĵo kaj jen mi ekvidis en la akvo muskapon, kiu min fikse rigardis per siaj malfermitaj okuloj. Proksimume post unu minuto la fenomeno malaperis kaj mi rimarkis, ke tiu muso naĝas sub

la akvo direkte al kluzpordo, kie ĝi denove elŝovis la kapon alten super la akvon, ekfajfis, kaj mergiĝis por ne aperi plu. Tiujn ĉi liniojn, aŭ pli bone tiun ĉi rememoron el miaj junaj jaroj mi donas je dispono al la estimata redakcio kun postulo, ke en konvena tempo ĝi uzu ĝin, ĉar tiu ĉi fenomeno estas certe rara kaj malofte aperanta. Plenrespekte Josef Barhoň, profesoro pri naturscienco en gimnazio en Kněževec." (Trad. J. Patera)

Programo de kunvenoj de la klubo en januaro, februaro kaj marto 1987:

5. 1. 1987	La Jubilea Jaro 1987	– Patera
12. 1. 1987	B e r l i n o (diapozitivaj)	– J. Jiroušková
19. 1. 1987	Informoj pri Pisanica	– Ing. Dvořák
26. 1. 1987	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	– H. Štruncová
2. 2. 1987	Reprezentado de E-organizoj en internaciaj eventoj, precipe en la Pac-kongreso en Kopenhago Mia nova romano (parte ĉeĥlingve) Ĉeĥoslovakaj urbaj blazonoj J a r k u n v e n o	– D-rino Vančurová
2. 3. 1987	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	– H. Štruncová
9. 3. 1987	Verda Ĉaro de Julio Baghy	– E. Seemannová
16. 3. 1987	Iom pri la astronomio	– J. Patera
23. 3. 1987	El malnova magnetofono	– J. Patera
30. 3. 1987	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	– H. Štruncová
6. 4. 1987	Aprilo!	– J. Patera

La kunvenoj okazas ĉiulunde de la 38.00 ĝis la 20.00 h (do je 30 min. pli frue laŭ peto de klubanoj) en la klubejo en Malinová-str. n-ro 25 en Zahradní Město.

La 29-an de novembro 1986, post mallonga malsano forlasis nin nia longjara membrino, oferema laborantino de nia movado, kompleza instruistino kaj prelegantino
s-anino Juliana B e n d o v á ,

en aĝo de 88 jaroj. Niaj klubanoj adiaŭis sin la 4-an de decembre en la nova tombejo en Olšany, kie ŝi estis enterigita en familian tombon. Ni ĉiam memoros pri ŝi.

La komitato de la klubo dankas al jenaj gesamideanoj pro iliaj malavaraj mondonacoj: Anna Fryšová 110,- Kčs, Olga Ungerová 100,- Kčs, Jan Šilhán 70,- Kčs, Marie Zaměstná 40,- Kčs, Marie Klementová 30,- Kčs, Ondřej Jeníček 10,- Kčs, Ladislav Kynčl 10,- Kčs kaj Blažena Holubová 50,- Kčs. Elkoran dankon al ĉiuj.

Aŭtune vizitis nian klubon nederlandanoj, finno kaj aŭstrianano. Ni multe ĝojis, ĉar ĉiuj informis nin prelegforme pri la movado en iliaj landoj. H.Š.

Favoran recenzon pri la 5-a n-ro de nia Bulteno elsendis RADIO POLONIA (red. Andrzej Pettyn) la 18-on, 19-an kaj 21-an de novembro 1986.

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj, karaj geamikoj, ni deziras al vi ĉiuj agrablan Kristnaskon kaj multajn sukcesojn, konstantan feliĉon kaj firman sanon en la nova jaro 1987! La Jubilea Jaro estu turnpunkto en la progresigo de nia movado. La Komitato de EKP.

BULTENO de Klubo de Esperantistoj en Praha (loka grupo de ĈEA), p.k. 1069,
111 21 Praha 1. Redaktass Kultura komisiono, ĉe la komitato de la Klubo de Esperantistoj en Praha.